
# Komunikoj

JARO 35-a | OKTOBRO - NOVEMBRO - DECEMBRO | N-ro 140 2010

"Amu vian Dion
per via tuta animo
kaj vian proksimulon
kiel vin mem."
Jesuo

**Naskiĝi, morti, renaskiĝi ankoraŭ kaj ĉiam progresi tia estas la leĝo.**

# 35 JAROJ DE FRUKTDONA SEMADO



Délio P. de Souza

Eldonejo Lorenz, fondita la 15-an de Decembro 1975 estis revo de tri idealistoj, la Fratoj Délio kaj Nelson Pereira de Souza, kaj Getúlio Soares de Araújo, laŭ antikva sonĝo de Ismael Gomes Braga por fondi spiritista-esperantistan organizaĵon, celante diskonigi Spiritismon, pere de Esperanto, al la tuta mondo. Post 35 jaroj de bona semado, nia Eldonejo sekvas la vojon planitan de la pioniroj, disvastigante la trioblan idealon: Evangelio, Spiritismo, Esperanto. Ĉio ĉi, sendube, ni elkore dankas al ĉiuj kunlaborantoj, sed, speciale, al niaj karegaj anoj, kiuj dum tiu longa periodo vere subtenis nian Eldonejon.

## RETROSPEKTIVO 2010







Lorenzanoj tre aktivis en 2010! Dum la Universala Kongreso de Esperanto, en Kubo, en la kunsido organizita de nia Eldonejo, pli ol 100 personoj ĉeestis la prelegon de Paulo Sergio Viana pri Spiritismo kaj ili ricevis, krom Almanako Lorenz 2010, tie lanĉita, multajn spiritismajn librojn en Esperanto. Alia vigla laboro okazis dum la Movada Foiro, en tiu sama kongreso, kiam nia Eldonejo ekspoziciis siajn librojn kaj disdonis multajn flugfoliojn pri la Spiritisma Doktrino. Kompreneble, ni ne povas forgesi la efikan partoprenon de la tre aktiva junulo Álvaro Motta en la programo de la Internacia Junulara Kongreso, ankaŭ en Kubo. Tie, Álvaro prelegis pri Spiritismo kaj ankaŭ disdonis multajn spiritismajn librojn. Krom la internaciaj kongresoj, la lorenzanoj ĉeestis plurajn esperantistajn renkontiĝojn en Brazilo.

Koncerne libroeldonadon, Asocio Lorenz eldonis 5 spiritismajn librojn en la portugala lingvo kaj reeldonis 3 en Esperanto; novaj eldonoj en Esperanto estis la tradicia *Almanako Lorenz 2010* kaj *Aidoso, Ege Trans la Doloro*. Sed, la ĉefa ĉijara eldono estis la dulingva Agendo Lorenz, la unua tiaspeca en Brazilo.

Do, karaj geamikoj, jen ni, kiel humilaj servantoj, pretas por en 2011 meti alian ŝtoneton sur la grandan kontruaĵon, kun la trankvileco de konscienco, ke ni plenumas la planojn de la pioniroj.

Dio benu vin ĉiujn!
La Estraro
Eldonejo Lorenz




**FELIĈAJ ESTAS TIUJ, KIUJ MALSATAS KAJ SOIFAS JUSTECON, ĈAR ILI SATIĜOS.**
(Jesuo)

# TREZORO EL NIAJ ARKIVOJ

Al sr° Isamel Gomes Braga

S. Feliciano, RGSul, 29/6/1942

Tre Estimata Samideano kaj Frato:

Korajn salutojn al Vi kaj al Via ŝatata Familio.

Via letero el la 10ª de la kuranta monato donis al mi plezuron ekscii pri la inaŭguro de la "Associação Esp-sta Meyer"[1], kaj mi deziras al tiu nova batalanto por Esp° grandan prosperadon.

Legante pri la "Kanto de l' Eklezio mi ekmemoris ke jam kelkafoje mi estis decidinta skribi pri unu erarita vorto en mia traduko de la brazila himno, sed ĉiam mi forgesadis pri tiu decido: nun, fine, mi ĝin efektivigos, kaj estas jena: en la dua linio mi skribis) kaj la revuo B.E. [2] presis "eĥoan", kiel se ekzistus en Esp° radiko "eĥo", sed devus esti "eĥozan" aŭ "eĥantan". La eraro estis mia, ĉar mi ne ekmemoris ke la radiko estas "eĥ". Tial mi petas, ke Vi okaze korektu ĝin.

Pardonu ke mi ne komencis ankoraŭ la daŭrigadon de la verko "Esp° sem Mestre". Ĉar mia edzino daŭris kaj daŭros malsana, mia koncentrado je tiu laboro ne estus sufiĉe bona, kiel eble Vi jam rimarkis en la malmultaj paĝoj kiujn mi tradukis el la Libro de la Spiritoj.

Marta, dank' al Dio, jam preskaŭ tute resaniĝis. Hodiaŭ ŝi iros viziti sian fratinon Ema Bieszczad, kiu nun loĝas malproksime, en kolonio.

Kun sinceraj deziroj de sano kaj prosperado Via kaj de Via Familio.

Mi estas Via dankema frato

F. V. Lorenz.

[1] Nuntempe: Esperantista Asocio de Rio de Janeiro.
[2] Brazila Esperantisto

# LINGVA PROBLEMO EN LA SPIRITA MONDO



En la sfero plej proksima al la Tero, la lingvoproblemo apartenas al la nombro de tiu, kiuj plej afliktas nian konsciencon.

Efektive, la simbola lingvaĵo estas la plej grava por la grandaj kolektivoj de la Spiritoj noble progresintaj.

La regado de la pura arto estas tie la senĉesa sublimiĝo de la Naturo.

La muziko diigas la frazon kaj la pentrarto rafinas la figuron; skulptiĝas elokventaj monumentoj kaj gravuriĝas fulmobrilaj poemoj, per la asociiĝo de koloroj kaj sonoj, ĉe la miregiga kemio de la penso.

Tiu loĝejo de numesoj, simila al la Kampoj Eliziaj de la mitologia tradicio, situas, tamen, multe transe de la homa hejmo, kie floras la esperoj.

Eĉ tie ĉi, kvankam malfermiĝas milionoj da renovigaj horizontoj, ni tamen estas disigitaj de la lingva baro.

Pioniroj de la pogreso, ili laŭbezone kontaktas kun noblaj idiomoj aŭ superregas dialektojn tie kaj ĉi tie. Tion, tamen, ili efektivigas kun reduktita profito en la eduka laboro, kiun ili celas realigi.

Por tio, la plej kapablaj, el la morala vidpunkto, reenkarniĝas en la landoj kaj regionoj, kiuj dediĉas al ili ian korinklinon, oferante sin por la kultura havaĵo ili karakterizanta, konsumante jardekon por ke tiuj regionoj liveru al siaj konceptoj mem tiun aŭ alian rimedon por ilia pliboniĝo.

Tio okazas, ĉar la parolo eldirita aŭ skribita ankoraŭ estas aŭ estos dum jarmiloj la agento de transsendo de la spiritaj valoroj, stariganta la kuniĝon de la animoj sur la vojo al la Granda Lumo, en la regionoj de la lernado, en kiuj efektiviĝas la evoluaj luktoj.

F.V. Lorenz

(Mesaĝo psikografie ricevita per Francisco Cândido Xavier, en la urbo Uberaba, MG, Brazilo)

**FELIĈAJ ESTAS LA KORE PURAJ, ĈAR ILI VIDOS DION.** (Jesuo)



## KURIOZAĴOJ EL LA LETEROJ DE ZAMENHOF

Al Sinjoro I.V. en T. 1889

Vi plendas, ke en via urbo ĝis nun neniu ankoraŭ ion scias pri la lingvo Esperanto! Nun, kiu estas kulpa? Se la amikoj en T. anstataŭ ion fari kaj vastigi nian aferon atendos ke oni laboru energie, ke oni faru la aferon pli konata en ilia urbo – tiam nia afero estas ankoraŭ malmulte konata en Via urbo!! Ne forgesu, ke en nia afero mi estas nur unu el la laboristo, kaj se mi devus mem kaj sola fari la tutan aferon, kiu devas esti farata de multaj amikoj en multaj lokoj, tiam nia afero estus perdita.

*L.Z.*

Al s-ro R-g en P. 1889

Via rakonto en Gogol estas tradukita tute bone; sed bedaŭrinde ni ne povas ĝin uzi, ĉar ni havas jam grandan amason da tradukitaj rakontoj. Por la "Esperantisto" ni petas Vin sendi sciigojn, novaĵojn, korespondojn, ĉar por entrepreni rajontojn la gazeto estas tro malgranda. Se Vi povas eldoni Vian rakonton je Via propra kalkulo, kiel aparta libreto, Vi alportos grandan utilon al nia afero.

*Z.*

Al s-ro R. en Biela – 1889

Fari ion por nia afero povas ĉiu, se li eĉ loĝas en la plej dezerta vilaĝo. Se Vi faros al Vi regulon dissendadi ĉiumonate aŭ ĉiusemajne certan nombron da vortaretoj (kun antaŭparolo) al diversaj personoj, tiam Vi alportos al nia afero multe pli grandan utilon, ol multaj amikoj, kiu loĝas en grandaj urboj.

*Z.*

## LA AMA PORDISTO


Fabiano,
Lumanta Fabiano,
Vi estas la Patro de la senprotektaj,
De la malriĉaj suferantoj.
Via rideto
Ĉesigas la doloron, sekigas la ploron
Ĉar vi estas filo de la Plejalta,
Fabiano.

Kiel estas ĝoje
Resti ĉe vi,
Iri en via lumo,
Via vojo
Estas rekte al Jesu'.


Vi estas ama pordisto
De la fonto, kiun
Neniu posedas:
Akvon, vivon, karitaton,
Amon kaj lumon...

Fabiano,
Lumanta Fabiano,
Vi estas la Patro de la senprotektaj,
De la malriĉaj suferantoj.
Via rideto
Ĉesigas la doloron, sekigas la ploron,
Ĉar vi estas filo de la plejalta,
Fabiano.

Tradukita de Délio P. de Souza
Kunlaboro de Edgard Machado



Délio P. de Souza



Edgard Machado

**JEN TRE AKTIVAJ SAMIDEANOJ EL AŬSTRALIO, BOB KAJ TREVOR, AMIKOJ DE NIA ELDONEJO.**



Treyor, diligenta samideano kaj Katja, simpatia edzino.




Bob kaj la bela muzikilo balalajko.

Audrey, Todd kaj Linda, jen la tre simpatia familio de nia kara Bob.

**FELIĈAJ ESTAS LA PACIGANTOJ, ĈAR FILOJ DE DIO ILI ESTOS NOMATAJ.** (Jesuo)

# QUE BELO PRESENTE NESTE NATAL!




A primeira agenda bilingue com biografias de eminentes espíritas-esperantistas e centenas de frases de auto-ajuda, além de muitos outros detalhes que, com certeza, vão lhe agradar!

Precinho de lançamento: **R$ 10,00**

Na compra acima de 5 exemplares, apenas **R$ 8,00.**

Peça já a sua! Presenteie um amigo!




ISBN: 978-85-86984-56-3
14x21 cm – 280 páginas

R$25,00

*"Natal, é amor em ação. Toda vez que nós amamos, toda vez que nós damos, é Natal."*

*Dale Evans Rogers*




R$15,00

## CAMINHO PARA A FELICIADADE

José Carlos Leal

Este é um livro que trata da felicidade; entretanto, o leitor não encontrará nele fórmulas prontas, pois, como o livro revela, a felicidade é uma conquista pessoal que cada ser humano deve realizar.

Um outro aspecto que o livro aborda é o da felicidade relativa, ou seja, a felicidade que nos é possível em um mundo de provas e expiações, como é o caso da Terra. Por fim, o leitor deverá, ao ler o livro, observar quais são os comportamentos inadequados para a busca desse tipo de felicidade e eliminá-los de sua vida.

Esperamos, por fim, que este livro tenha alguma utilidade para você, ajudando-o a viver uma vida de mais qualidade.

## A CAMINHO DO MUNDO DE REGENERAÇÃO

Jorge Pedreira de Cerqueira

Vale a pena estudarmos com JORGE CERQUEIRA esta obra singular, onde o autor aborda assuntos palpitantes, de uma forma absolutamente didática, simplificando a nossa compreensão de temas complexos como: Evolucionismo e Criacionismo; A Evolução do Princípio Espiritual; O Homem, o Cérebro e os Corpos; Os Primórdios da Civilização Terrenas; Ser e Estar, num Eterno Vir a Ser; as Glândulas Pineal e Epífese; Os Quatro Reinos; Os Elos Perdidos da Evolução Genética; A Civilização Egípcia; As Grande Religiões do Passado, entre outros temas fascinandes.

LORENZ Tel.: (21) 2221-2269
editora_lorenz@uol.com.br

## ĈU VI ANKORAŬ NE REALIĜIS POR 2011?!!!

Se vi ankoraŭ ne realiĝis, ne forgesu ke via jara kontribuo tre-ge helpas nin eldoni spiritismajn verkojn en Esperanto kaj ilin sendi, tute senpage, al niaj eksterlandaj samideanoj.

Kaj vi, kara amiko, kiu neniam ne aliĝis, petu informojn kaj kun plezuro ni vin sciigos pri la laboro de nia Eldonejo kaj kion vi, kiel nia ano, ricevos en la konforto de via hejmo.

Dio benu vin!

**Editora_lorenz@uol.com.br**
Tel. (21) **2221-2269**

LORENZ

**SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ**
Rua dos Inválidos, n. 34, grupo 903
Caixa Postal 3133 - CEP 20001-970
Rio de Janeiro (Brasil)
Tel. (21) **2221-2269** <editora_lorenz@uol.com.br>